


Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2012:2 (mar-apr)

**American
Esperantist**
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2012:2 (Mar-Apr)



Estonten!

Ĉi-numere:

- Kiel konservi
niajn atingojn?
- Revenas Du jaroj
kamerune
- Adiaŭas Efke,
gramatike
- ... kaj multe pli!

**Invito al la 60-a Landa Kongreso de Esperanto-USA:
Jen tempo por proponi prezentaĵojn! (pĝ. 6)**

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin

Vol 51, No 2 — 2012:2 (mar–apr)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retroŝtonon, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Orlando E. RAOLA

Vicprezidanto • Vice President: Philip G. DORCAS

Sekretario • Secretary: Steve BREWER

Kasisto • Treasurer: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • Other board members: George

BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY,

Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Gan STARLING, Julie WINBERG,

Christine WINGROVE.

Forpaso: Rick MILLER

Nia membro Rik' MILLER subite forpasis la 2-an de Marto ĉe sia hejmo en Muskego, Viskonsino, kie li suferis severan koratakon. Patro de kvar gefiloj, li havis nur 45 jarojn.

Rik' estis aktiva esperantisto en multaj rondoj, interalie en la Lernu-komunumo kie li ludis gravan rolon en la forumoj kaj diligente instruis lernantojn.

Eblas sendi kondolencojn al lia familio (prefere angle) ĉe <dsmler95@gmail.com> aŭ ĉe <http://facebook.com/rdmiller3>.

[Dankon al Erin PIATESKI pro la informo.]

Korespondi deziras

Mi estas 13-jaraĝa membro de la Junulara Esperanto-Klubo de Shanthi (JEKS), Sri-Lanko. Mia patro estis ĵurnalisto kiu forpasis en 2009. Nun mi vivas kun miaj patrino, fratino kaj avino. Mi lernas en la 6-a klaso ĉe la lernejo Diyatatalawa M.V. kaj mi estas membro de la grupo "St. John Ambulance Association of Sri Lanka".



G. M. Ranjika SUBASHANI

<info.welfare@gmail.com>

Verku por Usona Esperantisto!



Ni daŭre serĉas kontribuantojn kiuj pretas verki regulajn rubrikojn, aŭ ses- aŭ tri-fojojn jare. Aparte bezonataj estas recenzoj de verkoj en Esperanto aŭ anglalingvaj verkoj pri Esperanto. Se vi volus kontribui, bonvolu proponi vin kaj vian ideon al la redakcio, ĉe:

bulteno@esperanto-usa.org

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone: _____ E-mail: _____

Birthdate (MM/DD/YY): ____/____/____

In the member list, don't publish my: postal address phone email address

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

I would like to receive the magazine, *Usona Esperantisto*, in:

Paper form only Electronic (PDF) form only *(email address required)* Both

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

Upcoming events

For a comprehensive list of upcoming events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu>>.

May 19 – 21 (Quebec City)

Mid-Canada Gathering (MEKARO)

Each May the *Mez-Kanada Renkontiĝo* meets in a Canadian city in the province of Ontario or Quebec. MEKARO is a weekend of tourism via Esperanto that provides opportunities to learn about the host city, sample local delicacies (and beer), and make friends with other Esperanto speakers. This year the gathering meets in Quebec City, one of the most visited destinations in North America due to its history, beauty, and charm. MEKARO isn't just for Canadians: Esperantists from everywhere are warmly encouraged to attend, and participants from the USA regularly take part. For more information, see <<http://mekaro.ca>> or contact <informo@esperanto.qc.ca>.

June 22 – 25 (Dallas, Texas)

Landa Kongreso de Esperanto-USA

This year our National Convention comes to the University of Texas at Dallas (UTD). The program includes a variety of talks, informal get-togethers, games, excursions, and a banquet. Sign up at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> (click on "National Congress" on the left side of the page). Come join us and help celebrate Esperanto's 125th anniversary! Then, stay for...

June 25 – July 4 (Dallas)

NASK: La Nord-Amerika Somera Kursaro

This year the North American Summer Esperanto Institute (NASK) follows the *Landa Kongreso*—not only in the same city, but in the same building—so you can participate in both events with just one trip. Like last year, NASK now includes eight days of study; those arriving early for the *Landa Kongreso* will have 12 consecutive days in *Esperantujo*. For information on this year's instructors, program details, and fees, visit <<http://esperanto.org/nask>>.

Contact addresses

Addresses for some of the larger local groups that meet semi-regularly. Please send updates to <bulteno@esperanto-usa.org>.

California

Los Angeles: <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:
<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Florida <http://niasfero.blogspot.com>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

Missouri (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

New Jersey (Princeton)
<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

North Carolina (Raleigh Durham)
charles.o.mays@gmail.com

Texas

Austin: <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)
<http://seattleesperanto.org>

Wisconsin (Madison)
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>



Esperanto Jubilee 2012

Help UEA publicize Esperanto in 2012, the Jubilee Year of the publication of the *Unua Libro!*

This Esperanto Day, the 26th of July, will be a unique occasion and a network of information officers has been set up worldwide to contact mass media outlets about Esperanto's anniversary.

The United States is a large country with an immense opportunity to present Esperanto to regional media outlets, and UEA needs a wider network of activists there at the local level. This isn't an impossible task. The *Esperanto-Asocio de Britio* had a series of publicity successes 2011, resulting in many spin-offs such as the BBC Celebrity University Challenge Programme in December.

If you are able to help, please let me know at <jubilea.jaro.125@gmail.com>, or see <http://uea.org/vikio/Agadoj_125>. We will give you all the support you need.

— Brian BARKER
 Respondeculo pri Informado
 UEA Internacia Laborgrupo

Helpu flegi Esperanton en Indonezio

La Esperanto-movado en Indonezio multe kreskis en la lastaj du jaroj de preskaŭ nulo. Kelkaj grupoj aktivas, ekeldoniĝis la bulteno *Esperanto en Indonezio*, Tatjana LOSKUTOVA el Rusujo instruis en kvin urboj, du indonezianoj partoprenis E-aranĝojn en Eŭropo... Tamen la planto ankoraŭ bezonas fortikiĝon.

Ni alvokis la indoneziajn esperantistojn kandidatiĝi por subvencio cele al partopreno en UK kaj IJK en Vjetnamujo ĉi-jare, kaj venis ĝis nun jam pli ol 20 respondoj. Du el la respondintoj jam ricevis kotizon helpe de eŭropaj esperantistoj. Por pluraj el la ĝisnunaj kandidatoj, kiuj ankoraŭ ne havas 20 jarojn, la vojaĝkostoj tro grandas. Ni do volas peti vin helpi ilin.

Eblas ĝiri monon al la Fondaĵo Tria Mondo, al la konto "Azio", aŭ al la konto "helpid" de TEJO (ĉiuj ĉe UEA) por helpi pagi la kotizojn aŭ parton de la vojaĝkostoj (ne forgesu mencii "por indonezianoj al UK").

Se tamen vi preferas pagi por iu specifa persono, kontaktu nin por ke ni aranĝu tion. Aldone, bonvenas subteno por la daŭra aperigo de *Esperanto en Indonezio* (kie vi povas legi multon pri la progreso de la tiea movado: <<http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio>>.

Por tio, donac(et)oj bonvenas al la UEA-konto "iesaa-p". Por membriĝi denove indonezianojn al UEA, oni povas ĝiri al Fondaĵo Canuto (ĉe UEA) kun mencio "por indonezianoj".

Por ĉiaj demandoj, vi povas kontakti min ĉe <redakcio-ideo@googlegroups.com>. Koran dankon!

— Heidi GOES

La 60-a Landa Kongreso de Esperanto-USA

22–25 Junio

Universitato de Teksaso en Dalaso

La vorto *Estonten* kaj la teksasa vakero estas simboloj de nia antaŭeniĝo en la estontecon. La bildo ankaŭ memorigas vin ke, kiam vi venos al ĉi tiu Landa Kongreso, vi ĝuos teksasan bonvenigon!

Ni rimarkas kaj estimas la nekredblan laboron de la esperantistoj de historio, kiuj venigis nin al kie ni estas nun. Ni ankaŭ rimarkas kaj estimas la fakton ke ni nun vivas en epoko de nekredbla teknologio. Ni bezonas estimi la pasintecon kaj bonvenigon, kio estas nova kaj utila.

Vendredon vespere, la 22-an, vi estos bonvenigitaj per vera teksasa fajrorostita manĝo, kiu inkluzivas vegetaran elekton. Do, venu malsata!

Niaj ĉefparolantoj estos Birke DOCKHORN kaj Bertilo WENNERGREN, internacie konataj gvidantoj en la Esperanto-movado. Birke ankaŭ instruos dum NASK, kiu okazos tuj post la Landa Kongreso en la sama loko.

Estas spaco en la kongresa programo por 44 kunsidoj inter sabato matene kaj lundo matene. Do bonvolu sendi proponojn por prezentaĵoj kiujn vi deziras prezenti!

Bonvolu aliĝi al la Kongreso per la retbutiko de Esperanto-USA. Bonvolu sendi viajn demandojn kaj proponojn por prezentaĵoj al: <lk2012@esperanto-tx.org> aŭ <eusa@esperanto-usa.org>.


The 60th National Congress of Esperanto-USA

June 22–25

University of Texas, Dallas

The word *Estonten* and the galloping cowboy are symbols of our movement into the future. The image is also a reminder that

Estonten!



when you come to this National Convention, you will enjoy a Texas welcome!

We recognize and appreciate the incredible work of Esperantists in history who have brought us to where we are now. We also recognize and appreciate the fact that we live in an age of incredible technology. We need to appreciate the old and welcome the new.

On the evening of Friday the 22nd you will be welcomed with a real Texas barbecue, with vegetarian options. So come hungry!

Our keynote speakers are Birke Dockhorn and Bertilo Wennergren, internationally recognized leaders in the Esperanto world. Birke is also an instructor for the Esperanto Summer School, which follows on the heels of the Congress at the same location.

There's room in the program for up to 44 sessions between Saturday morning and Monday morning. So please send write-ups of the programs you would like to present!

Register online through the Esperanto-USA online bookstore. Please send your questions and proposals for presentations to <lk2012@esperanto-tx.org> or <eusa@esperanto-usa.org>.

Peto de prezento-proponoj

Landa Kongreso de Esperanto-USA

23–24 Junio, 2012

Bonvolu sendi surpaperajn respondojn al:

Loka Kongresa Komitato, c/o Phil and Beth Dorcas
900 Country Club Lane, Fort Worth, TX 76112

Bonvolu sendi retajn respondojn al:

<lk2012@esperanto-tx.org>

La Landa Kongresa Komitato (LKK) de Esperanto-USA petas proponojn por 20- kaj 50-minutaj prezentoj je la 23-a kaj la 24-a de Junio. Bonvolu sendi titolojn kaj mallongajn resumojn (ne pli ol 50-vortajn) kiel eble plej baldaŭ.

Ĉiu aŭtoro bonvolu sendi siajn nomon, adreson, kontaktinformon, mallongan biografian deklaron, deziritan daŭron, kaj mallongan resumon kiel eble plej baldaŭ. La biografia deklaro devas esprimi la jenan: kiu vi estas, kion vi faras, kaj kiaj estas viaj Esperantaj spertoj. Ni eldonos la deklaron en la kongresa libro.

Prezento povas havi ajnan temon, kondiĉe ke ĝi decas por familie orientita kunveno kiel LK2012. Se la temo ne specife koncernas Esperanton, tiam la prezentado devas esti en Esperanto.

Vi devas sendi al ni la finan neton de la prezentaĵo en ret-prezentebla formato antaŭ la 1-a de Majo, 2012.

La LKK ankaŭ konsideras publikigi la prezentaĵojn rete kaj fari aŭdvidajn registraĵojn de prezentoj se volontuloj kaj ekipaĵoj estas disponeblaj. Tio ĉi eble estos farita se taŭgaj kvit-atestoj de kopirajto estos subskribitaj, donante al Esperanto-USA rajton uzi la materialojn por antaŭenigi Esperanton.

Por planaj celoj bonvolu respondi al la sekvaj demandoj kiam vi proponas vian titolon kaj mallongan 50-vortan resumon kiel eble plej baldaŭ:

1. **(Jes / Ne)** Mi volas ke mia prezentaĵo estu havebla rete.
(Jes / Ne) Mi subskribos kvit-ateston de kopirajto por tiu ĉi celo.
2. **(Jes / Ne)** Mi volas ke oni filmu mia(j)n prezento(j)n.
Aŭ (Jes / Ne) Mi mem aranĝos por filmado de mia(j) prezento(j).
3. **(Jes / Ne)** Mi permesos retan elsendon de mia(j) prezento(j) por tiuj, kiuj ne povas ĉeesti.
(Notu: Ne estas garantio ke via prezento estos elsendita.)
4. **(Jes / Ne)** Mi volas ke oni trejnu min pri kiel organizi mian prezenton por filmado.
5. **(Jes / Ne)** Mi permesas al Esperanto-USA uzi filmon de mia(j) prezento(j) por antaŭenigi Esperanton.

Poloj en dalasa rondo

Raportas Filipino DORCAS

DALASO, TEKSASO – la 4-an de Marto, la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso bonvenigis du gastojn al la konversacia rondo en Dalaso. La gastoj estis Adam WILKUS kaj lia amiko Peter (la angla formo de lia pola nomo). Ili venis de Pollando, kaj ni multe ĝuis la tempon kun la gastoj. Adam donis al la klubo Esperantan libron pri Krakovo, ilia urbo. Kia ĝuo havi ilin en nia rondo! Salutis kaj bonvenigis la gastojn la lokaj esperantistoj Fred MEYER, Ron WOLF, Daniel BROWN, Mary Fay MARKS, Caroline BRANDON, Elizabeto DORCAS, kaj Filipino DORCAS.

Raporto el la E-insulo

Raportas Ron GLOSSOP

HAIKOU, ĈINUJO – Dum kvar semajnoj en Januaro kaj Februaro esperantistoj el 23 landoj kunvenis ĉe Hajnan-Insulo. Entute partoprenis 131 homoj, 68 el diversaj urboj en Ĉinujo kaj 63 el 22 aliaj landoj. Ni ĉiuj kune interparolis, studis, kantis, manĝis, festis, kaj interkonatiĝis.

Efektive okazis tri aferoj samtempe kaj samloke. Unu estis la BEK-kurso instruita ĉefe de Dennis KEEFE por tiuj kiuj aŭ eklernis aŭ deziris plibonigi sian uzon de nia tutmonda lingvo. Ili plejparte estis el Ĉinujo, Koreujo, kaj Mongolujo. Dua afero estis kurso instruita de Katalin KOVATS por tiuj kiuj jam instruas Esperanton ie en la mondo. Ili plejparte estis el Eŭropo sed ankaŭ el Aŭstralio kaj Ĉinujo. Tria afero estis la tute nova Universitato de Esperanto, universitat-nivela kursaro kiu uzis Esperanton por instrui pri aliaj aferoj. Ili estis kurso *Filozofio kaj Historio*

de la Informadiko instruita de Federico GOBBO kaj *Alfronti Militon* instruita de Ron GLOSSOP. En tiu lasta kurso partoprenis 15 studentoj el 9 diversaj landoj. Tiuj kursoj poste estos haveblaj al esperantistoj ĉie en la mondo senpage en la Tut-Tera Teksaĵo. Estis teamo de ĉinoj (Arko, Hosemo, Karilo, Spado, Trezoro, Trigo, WU Chengzhen) kiuj faris diversajn aranĝojn por la evento.

Mirinda afero estis la rapideco de lernado de multaj studentoj en la BEK-kurso, sed ili studis ok horojn tage kaj ili havis ŝancon interparoli multe kun spertaj esperantistoj. La instruistoj lernis multon pri diversaj metodoj kaj materialoj kaj fontoj de utila informo. La studentoj en la Universitato de Esperanto lernis multon kaj diskutis multe pri la specialaj temoj de tiuj kursoj. Je la ferma kunveno studentoj ricevis atestilojn kaj ĉiuj ĝuis festan etoson.

Ne ĉio estis perfekta. Ĉefe la vetero ne estis bona, multe pli malvarma kaj pluvema ol kutime en Hajkou dum la vintro. Tamen ĉiuj spertis neforgeseblan etoson de vera tutmonda familio, kaj sento de Hajnan-Insulo nun estas kaj estonte iĝos grava ponto por esperantistoj el diversaj mondpartoj.



Ron ricevas diplomon de Federico GOBBO.

Kia neŭtraleco? (2-a parto)

Kiaj materialoj estu akcepteblaj en *Usona Esperantisto*? Ĉu nia gazeto neniam publikigu materialojn pri religiaj, politikaj, aŭ aliaj temoj disputataj? Pli ĝenerale: kiel neŭtrala institucio, ĉu Esperanto-USA devus cenzuri la “ne-neŭtralajn” esprimojn de siaj membroj?

Pasintnumere mi levis tiajn demandojn kadre de nia organiza statuto, kiu postulas ke materialoj “tendencaj” ne aperu en la gazeto krom se ili klare rilatas al aŭ la lingvoproblemo aŭ Esperanto mem. Kvankam sendube bonintenca, tiu bedaŭrinde nebula regulo multe komplikas la redaktistan laboron. La opinioj de niaj membroj estas tiel diversaj kiel Usono mem;

preskaŭ ajna temo, kiel ajn “neŭtrala” ĝi ŝajnas unuavide, povas vekii disputon.

Ekzemple: antaŭ jaroj mi aperigis rubrikon pri astroj facile videblaj en la nokta ĉielo. Unu menciinda vidindaĵo estis najbara galaksio, proksimume du milionojn da lumjaroj for. Mi notis ke, pro la mirinda distanco, ni vidas la galaksion kiel ĝi estis antaŭ du milionoj da jaroj, kiam la lumo de ĝi unue ekvojaĝis. Jen interesa afero por konsideri dum somera nokto, ĉu ne? Nu, tiel mi supozis, naive taksante la temon “neŭtrala”.

Poste oni atentigis al mi – tute prave – ke eĉ tiu temo estas iusence tendenca, ĉar ĝi tuŝas religian disputon. Multaj usonanoj kredas ke la universo aĝas ne miliardojn da jaroj, kiel asertas sciencistoj,



Hoss FIROOZANIA

Hoss redaktas la gazeton en sia hejmurbo de Roĉestro, NY. Lia rubriko ne reprezentas la vidpunktojn de la estraro; pri siaj opinioj kulpas nur li mem!

hoss@lodestone.org

“Ĉu nia gazeto neniam publikigu materialojn pri religiaj, politikaj, aŭ aliaj temoj disputataj?”

sed malpli ol dek mil jarojn, kiel asertas iuj interpretistoj de la Biblio.

Nu, mi certe ne intencis mallaŭdi religian vidpunkton, kaj kompreneble mi ne volas ke leganto sentu sin malbonvena en nia rondo. Ofte ne eblas verki sciancan

artikolon kongruan kun ĉiaj religiaj kredoj, ĉar sciencaj kaj religiaj vidpunktoj foje baziĝas je malsamaj mondkonceptoj. Cetere, la dilemo pri neŭtraleco ne limiĝas al nur aferoj

religiaj: kaŝitaj en preskaŭ ajna temo troviĝas disputoj pri diversaj supozoj religiaj, politikaj, sociekonomiaj... ktp. Simple ne eblas tute eviti tiajn supozojn, kaj, laŭ mi, kutime ne indas provi.

Komplikanta la aferon pli estas foja konfuzo inter *institucia* neŭtraleco kaj *individua* neŭtraleco, du konceptoj iusence inversaj. Neŭtrala institucio ne nepre postulas ke *siaj membroj* estu neŭtralaj; efektive male. Neŭtrala institucio povas ne nur toleri diversajn vidpunktojn, sed eĉ honori tiun diversecon.

Tia neŭtraleco, eble, estis la speco kian celis Zamenhof. Li volis ke la internacia lingvo (kune kun ties instituciaj reprezentantoj) provizu “neŭtralan fundamenton” sur kiu bonvolaj homoj povus frate interkomunikiĝi, sen perdo de siaj

apartaj lingvoj, kulturoj, aŭ ideologioj. Do eble ni ne malinstigu niajn membrojn esprimi siajn apartajn ideologiojn en la gazeto, kondiĉe ke evidentas al leganto ke la vortoj ne prezentas oficialajn vidpunktojn de Esperanto-USA, sed nur la privatajn opiniojn de la individuaj aŭtoroj.

Similan ideon esprimis la usona esperantisto William SOLZBACHER antaŭ sesdek du jaroj. Li skribis:

Neŭtraleco ne postulas, ke Esperanto-gazeto neniam publikigu ion, pri kio kelkaj legantoj povus malkonsenti. Gazeto, kiu malplaĉas al neniu kaj neniam provokas malkonsenton kaj kritikon, estas teda kaj enuiga gazeto. Gazetoj de la neŭtrala movado devas konsideri siajn legantojn kiel maturajn personojn, kiuj estas kapablaj kompreni kaj toleri diversajn opiniojn, se ili ne estas esprimataj en insulta aŭ malobjektiva maniero. ... Neŭtrala Esperanto-gazeto devas antaŭ ĉio servi la disvastigon, lernadon kaj uzon de Esperanto. Por tio estas necese, ke ĝia enhavo estu interesa, informa, utila kaj sufiĉe varia por kontentigi diversajn gustojn. (el Amerika Esperantisto, Mar-Apr 1950)

Do por mi, kiel redaktisto, la ideo de “neŭtraleco” ne postulas ke mi cenzuru disputatajn temojn; ĝi postulas ĉefe ke mi strebu ne favori ŝatatajn vidpunktojn nek ekskludi aliajn. Okaze de disputoj mi preferas ebligi interparolon kaj honestan diskuton inter malsamideanoj, postulate nur ke ili restu ĝentilaj kaj respektu la dignon de ĉiuj homoj.

Tial mi bonvenigas artikolojn pri eĉ politikaj aŭ religiaj temoj, kondiĉe ke la enhavo estas ĉefe informada anstataŭ varba. Ankaŭ konvenas tuŝi disputatajn temojn en la ĝustaj kunteksto. En scienca artikolo, ekzemple, estas en ordo paroli pri sciencaj eltrovoj kiuj ne akordas kun kredoj religiaj. Same, se artikolo baziĝas je religia vidpunkto, konvenas tie kontraŭsciencaj asertoj.

Do, jen espereble pli preciza skizo de la ĝisnuna redakcia politiko:

- Preskaŭ ajna temo konvenas en letero; la leterkesto estu “libera zono” por opinioj. Nur gravas ke leteroj estu koncizaj, respektemaj, kaj – eble plej grave – ne tro longaj!
- Preskaŭ ajna temo konvenas por artikolo, kondiĉe ke la artikolo klare rilatas al aŭ la lingvoproblemo aŭ Esperanto.
- En artikoloj *ne* pri Esperanto, aŭtoroj ja rajtas tuŝi disputatajn temojn, sed la prezento prefere restu pli informada ol propaganda.
- Ĝenerale, faktoj kaj objektivaj eltrovoj (ekz. rezultoj empiriaj) estas pli konvenaj ol opinioj.
- Materialoj ne konfliktu kun la “interna ideo” de baza respekto al ĉiu homo. Kvankam foje decas kritiki ies vidpunktojn ĉi tie, maldecas kalumnii homojn aŭ atenci ties dignon, ĉu individue aŭ grupe.

Nu, kion vi opinias? Ĉu justa kaj sufiĉe “neŭtrala” politiko? Ĉu balasta? Ĉu ĝi maltrafas ion gravan? Kiel ĉiam, mi bonvenigas viajn reagojn. ★

What should an Esperanto course teach?

In centuries past it was common for language courses to emphasize grammar. In fact, language textbooks themselves were often called “grammars,” and in British and American schools there was so much emphasis in the early grades on learning grammar that we still sometimes refer to elementary schools as “grammar schools.” Vocabulary was taught less systematically. To a fair extent it was something students picked up by translating passages into and out of the language in question with the aid of a dictionary. This approach made a fair amount of sense for classical languages but was not well suited to producing conversational fluency.

People learning a language on their own, on the other hand, tend to start with vocabulary and some useful stock phrases and acquire grammar later. It’s remarkable how well one can communicate with a handful of words, a minimal set of phrases, and acting things out. Many years ago I bought some lens cleaner in a Paris camera store by miming cleaning my lens and saying, “*Jai besoin de queque chose pour...*” and I once bought typing paper in a Reykjavik stationery shop by making typing motions with my fingers and speaking one of the few words of Icelandic I happened to know, *blað* (paper). Even dogs and cats manage to communicate with their humans by pushing an empty food dish around the floor or standing by the door and looking plaintive.

More recently, possibly starting with the appearance of direct-method courses in the early 20th century, formal language teaching has gradually placed



D. Gary GRADY

Gary is editor of the bulletin of the American Association of Teachers of Esperanto. He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

more emphasis on the practical needs of everyday communication, including learning a useful vocabulary. There’s also more emphasis on the culture(s) associated with a language. A student studying Spanish, for example, is likely to learn something of the history and culture of Spain and Latin America along with some basic etiquette and even a knowledge of cuisine.

Esperanto textbooks and course materials show a parallel development. The Zagreb method, for instance, based its vocabulary in part on a study of word frequencies in Esperanto texts. Other word lists of use to teachers have been produced by the magazine *Kontakto* and by the Academy of Esperanto.

As previously mentioned here, *Kontakto*’s list is very well thought out. It’s available in various forms on the Internet. One of the most useful is found at:

<http://remush.be/tezauro/Kontakto.html>

A more extensive core vocabulary, the *Baza Radikaro Oficiala*, was released in 1974 by the Academy of Esperanto. You can find it online as well. Here’s the Academy’s page about the BRO:

http://akademio-de-esperanto.org/verkoj/baza_radikaro_oficiala.html

You might prefer this version with English translations from British Esperantist Edmund Grimley Evans. The page includes as a bonus some additional roots added by the website's owner:

<http://pilger.home.xs4all.nl/brenttl3.htm>

You can also find it by searching the web for “Baza Radikaro Oficiala” and “Edmund Grimley Evans”.

The BRO includes 2500 roots, divided into nine groups in declining order of frequency. The first four groups, comprising 546 roots, would make a good starting vocabulary for a new Esperanto speaker. You can find computer flash cards based on the BRO online, though I haven't tried them myself.

As for Esperanto's cultural aspects, this is something many courses still overlook. But someone making use of Esperanto needs to be familiar with the meaning of *krokodili*, UEA, LK, *Universala Kongreso*, AIS, *Akademio*, *La Espero*, Zamenhof, William Auld, *X-metodo*, and many other things that aren't what one would normally think of as being part of the language itself. Many modern courses, such as the *Ana Pana* series at *Lernu!*, do try to introduce learners to such things as the *Pasporta Servo* and attending a *Universala Kongreso* or *Internacia Junulara Kongreso*. Ian Fantom's 10-lesson correspondence course *Esperanto Viva!* offers the most thorough orientation to Esperanto culture I've seen in a beginning course, covering besides basic grammar and vocabulary such topics as Esperanto organizations and magazines, history, music, and so on. Unfortunately there doesn't seem to be an interactive online version available, and I'm not sure how

viva the course might be at the moment. You can find it here:

<http://www.esperanto.org/espviva>

But I've gotten a bit ahead of myself: Just what kind of Esperanto course are we talking about? One for elementary school students is likely to be different in content from one aimed at college students, and unless you're a professional teacher you might not have a chance to teach either in a traditional classroom setting.

In fact, a very high proportion of new Esperanto speakers today learn not from a textbook or formal course but rather on the Internet, most often at *Lernu!*. One might even ask whether there is any need for formal classroom courses now. Might we just to point people to *Lernu!* and let them progress past the beginning phase by reading and using the language at meetings and *kongresoj* and via email and the web—which is now probably what happens most of the time in any case? I wouldn't go that far, since while this clearly can and does work for many people, it isn't ideal. It's still common to hit a learning plateau and get stuck at the level of *eterna komencanto* or *eterna progresinto*.

Of course, anyone teaching a course today ought to take full advantage of on-

Join AATE!

Join the American Association of Teachers of Esperanto and you automatically get membership in the *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* and subscriptions to both the AATE *Bulletin* and the excellent *Internacia Pedagogia Revuo*. See <<http://aaie.us>>.

Pri la bezono konservi niajn atingojn

Trarigarde en la 125-jara historio de la Internacia Lingvo kaj ties tutmonda movado, mi ĉiam miris pri kiom multe ni sukcesis atingi en diversaj historiaj periodoj, kaj ankaŭ kiom relative malmulte ni sukcesis konservi kaj transdoni al novaj generacioj de esperantistoj, devigante ilin ĉiam denove reinventi la radon. Oni povas senfine analizi la kialojn de tia historia malstabileco. Miaj plej ŝatataj argumentoj estas la troa dependo de elstaraj unuopuloj, kiuj siavice maljuniĝas kaj forpasas, kuntrenante la tuton de sia kreitaĵo, kaj ankaŭ la neevitebla influo de la ĉiam ŝanĝiĝanta sociopolitika fono sub kies influo ni devige vivas kaj agas.

Mi volas ekzempligi tiun ĉi procezon pere de du agadkampoj esence gravaj por la esperanta movado kaj ankaŭ du kampoj pri kiuj mi povas dividi kun vi iom da miaj personaj spertoj: altlerneja edukado kaj radioelsendoj.

Mi vizitis Usonon unuafoje antaŭ dudek jaroj por partopreni trisemajnan someran kursaron de Esperanto en San-



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio. Vi povas kontakti lin per la adreso:

oraola@gmail.com

Franciska Ŝtata Universitato, sub la gvido de Reginald JADERSTROM kaj Ilona KOUTNY. Tiutempe, la somera agado en la Golfa Regiono altiris plurajn dekojn da gelernantoj el ĉiuj mondpartoj. La forpaso de la ĉefa motoro anima kaj financa malantaŭ la kursaro, Kathy SCHULZE, kombine kun malfavoraj ŝanĝiĝoj en la administrado de la Ŝtata Universitato en San-Francisko finfine elpelis nian plej gravan altlernejan agadon al la orienta marbordo, kaj poste reen al Kalifornio kaj poste... nu, ni kunvenos ĉi-jare dum semajno en Universitato de Teksaso, por la novtipa kursaro okazigita dum la lastaj jaroj de *Esperantic Studies Foundation*, organizaĵo starigita laŭ la heredaĵo (*Daŭrigo en pĝ. 13*)

line resources to augment classroom instruction. For one thing, outside of NASK or a school setting, it's rare for a course to meet more than once or twice a week, which is less than ideal. It's best if students learn a little every day, and *Lernu!* and the like give us a way to achieve that.

Finally, you might not have time to teach a traditional course, and if you do, especially outside a school setting, you may well have trouble finding a lot of students to commit to a formal class last-

ing weeks. A good practical alternative is a one- or two-day course—or sometimes even a one- or two-hour course!—on one specific aspect of the language, such as an overview of Esperanto literature or an intensive class in conversational skills or what to do at a *Universala Kongreso*. Another idea is to teach some other subject in Esperanto, ideally something that involves active student discussion.

Very short courses have many advantages, not least requiring less time commitment for all concerned. ★

de la prezidanto (de pĝ. 13)

de ges-roj Schulze. La demando estas, kial ni ne sukcesis konservi la atingojn de la pasinteco, la nivelon de la kursaro, la amasecon de la partoprenantoj. Ĉu la financa situacio de la mondo influis? Ĉu la disvastiĝo de Interreto kaj la novaj lerneblecoj forrabis eblajn studentojn de la somera kursaro? Ĉu la mondo entute perdis intereson pri Esperanto? Eble iom kontribuis ĉiuj ĉi faktoroj, sed mi aldonu, ke mankis en la tuta organizado de la kursaro eduka institucio kiu apogas la lernoagadon kaj servas kiel depono de la atingitaj edukaj valoroj. La itinera karaktero de tiuj kursoj ambaŭ tiam kaj nun, daŭre minacas la kontinuecon kaj vivipovecon de la tuta afero.

Kian institucion ni bezonas por subteni kaj pluevoluigi la studadon de Esperanto? Se ni alrigardas Eŭropon por serĉi respondon, ni povas lerni el la ekzemplo de Hungarujo, kie okazis la plej evoluintaj universitataj kursoj. Post la forpaso de István SZERDAHELYI kaj la politikaj transformiĝoj de 1989, la tuta entrepreno komencis disfali ĝis eventuala malapero. Denove montriĝas la troa graveco de la laboro de elstarulo kaj ne de vera institucio evoluo. La alia informfonto ĉi-kaze estas Ĉinujo, kie ja troveblas iom pli larĝa universitat-nivela Esperanto-agado, sed pri kies kvalitaj rezultoj oni malmulte aŭdas aŭ scias ekster Ĉinujo. Do, ĉar mankas taŭgaj modeloj, eble ni devos inventi propran (ja Usono famas ekzakte pri tiutipa inventemo).

Alia ekzemplo pri la nedaŭripovo de niaj atingoj estas provizita de la historio de radiofonio en Esperanto. La apero de Esperanto en la eteraj ondoj estas ligita al la unuaj provoj de internacia radioelsen-

dato. La unuaj jaroj estis sufiĉe detale priskribitaj en *Esperanto en Perspektivo*. Poste venis radioelsendoj el Havano, el pluraj brazilaj urboj, *Radio Verda*, ktp. Sed komence de la lasta jardeko pasint-jarcenta kaj dum la nuna jarcento, ni atestis iom post iom la disfalon kaj malaperon de preskaŭ ĉiuj radioelsendoj. Pasintajare kolapsis la plej fortika kolono: *Pola Radio*, kaj ĝia malapero markis la definitivan finiĝon de la ora epoko de la radio. Ĉu ni povas klarigi la tutan situacion surbaze de la senbrida ekspansio de la Interreto, kiu ebligas aŭskultadon kiam ajn oni volas anstataŭ kiam la radiostacio elsendas? Nur parte, ĉar ankoraŭ bone fartas radio-organizoj kaj radioelsendoj en pluraj lingvoj tra la tuta terglobo. Denove temas, miaopinie, pri malfortika strukturo malantaŭ la esperanto-agado, troa fidado je la kontribuoj de unuopuloj aŭ malgrandaj grupoj.

Antaŭnelonge, mi iom bruis interrete pri la ideo, ke ni trovu manieron kopii la modelon de Nacia Publika Radio de Usono por starigo de Internacia Radio-Reto en Esperanto. La ideo preskaŭ ne ricevis reehon, kaj nun mi volas relanĉi ĝin sur tiuj ĉi paĝoj.

Kia solvo?

Jen staras la problemoj kaj mi ja kunmetis plurajn demandojn. Mi invitas la asociojn/legantojn al aktiva forumo sur tiuj ĉi paĝoj, kie ni pridiskutu tiujn ĉi temojn kaj eblajn estontajn solvojn. Se vi konsideras, ke viaj respondoj estas dividindaj kun viaj samsortuloj, bonvolu reagi al tiu ĉi invito. La redaktoro de Esperanto-USA ĉiam plej volonte diskonigos viajn kontribuojn. ★

Malsamoj

“Ŭaŭ. Baldaŭ estos Kristnasko”, s-ino Mbapah diris, rigardante tra fenestro de la veturilo.

“Hm...” S-ro Mbapah murmuris sian akordon, kaj malpacience sonigis la hupon. Bovaro baris la straton, manĝante la herbon ĉe ĝiaj flankoj. Unu el ili levis sian voston kaj... *plop!* mezstrate.

“Ĉu tio memorigas vin pri Kristnasko?” mi demandis, ne komprenante la interligon.

“Hm. Jes.”

“Pro kio?”

S-ino Mbapah ridis. Usonanoj bezonas klarigojn pri ĉiu etaĵo. “Tiuj bovoj estas plidikigataj ĉar oni buĉos ilin ĉe la festo.”

“Aha”, mi elspiris mian komprenon.

Malsamoj abundas, mi pensis. Hejme, oni atendas la signojn de kristnasklumo, ornamitaj arboj, aŭ grandaj pneŭmataj Sanktaj Nikolaoj. Ĉi tie oni atendas bovojn fekantajn en la stratoj.



Kristnasko ja alvenis. Mi min trovis en la ĉefurbo, *Yaoundé*, ĉe mia gastiganta familio, kun kiu mi loĝis dum miaj unuaj tri monatoj enlande. Mi sidis ĉe la flanko de la avo – kalva maljunulo kun malsekaj okuloj – kiu ne ĉesis paroli pri mortintoj.

“Mi havas tri infanojn”, Avo sciigis al mi. “Aŭ, mi devus diri, mi *havis* tri infanojn. Mia filino jam mortis.”

“Ah, mi bedaŭras sinjoro.”

“Mortis”, li daŭrigis, “samkiel ŝia patrino. Jam pasis du jaroj de post la morto de mia edzino.” Li fiksrigardis la muron. Post momento li revenis el siaj pensoj kaj diris, “Ĉu vi vidas la foton tie?” almontrante al la muro.

“Jes.”



Joshua MORRIS

Joshua deĵoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso. Ĉi tie li dividas kun ni siajn ĉiutagajn spertojn.

josxuo@gmail.com

“Jen mia patrino. Ŝi estis bona virino. Kompreneble ŝi mortis...” li suspiris peze.

Tiam li turnis al mi siajn malsekajn okulojn kaj diris, “Estas biero.”

“Bonege”, mi diris. Avo ekstaris kaj malrapide forvadis.

Ankaŭ mi ekstaris kaj pliproksimiĝis al la foto de lia patrino. Ŝia aspekto esti tiel dura, krevita, kaj eluzita, kiel la kampoj dum seksezono. Kameruninoj laboras ĝis la dorso estas por ĉiam kurbita, kaj tiam ili laboras plu. Ne estas facile, esti virino en Kameruno.

“Jen, prenu.” Avo surprizis min de malantaŭe, puŝante en miajn manojn strangan botelon. Mi prenis ĝin: insektmortigilo.

“Dankon”, mi diris, pensante pri la biero kiun li menciis, kaj ankaŭ pri ĉiuj liaj mortintaj parencoj.

“Estas nenio”, li respondis, kaj turniĝis por revagi for.

“Ah, vi deziras ke mi faru kion per tio?” mi demandis al la malantaŭo de lia kapo.

“Ŝprucigu ĝin en via ĉambro.”

Mi iris eksteren por plenumi ĉi tiun kristnaksan deziron de Avo, kaj mi renkontis Raysa-n survoje. Ŝi estas unu el la nepinoj de Avo, vere plenkreska, en aĝo kaj formo. Kaj nun ŝi baras la irejon kiel bovoro.

“Joshua. Ĉu vi ŝatas Avon?”

“Jes... ni havis interesan konversacion.”

“Ho, ĉu? Bone, la familio pretas iri al preĝejo. Ĉu vi kuniros?”

“Certe”, mi diris, “sed lasu min unue mortigi la vivaĵojn en mia ĉambro.”

“O keĵ, jes. Iru kaj venu.”

Mi marŝis kun Raysa kaj la junaj infanoj al la strato por trafi taksion. Kiam mi eniris ĝin, Raysa fermis la pordon kaj diris “Bonan diservon! Ĝuu ĝin!”

“Kio?” mi demandis maltrankvile. “Ĉu vi ne venas?”

“Ne, mi tro okupiĝas. Ĝis!” Kaj la takso ekiris. Mi rigardis la infanojn malantaŭe. Ili returne rigardis min. Mi sakris subvoĉe.

En la preĝejo la infanoj ne ĉesis brui, kiel mi timis. Mi penis silentigi ilin, sen rezulto. Kaj fakte, la aliaj ĉeestantoj ne agis bonekzemple. Neniam antaŭe mi aŭdis tiom da flustroj, murmuradoj, kaj malfermaj babiladoj en preĝejo. Ankaŭ kriegoj. Virinoj el ĉiu angulo lamentis. Mi rapide maltrankviliĝis. “Jam sufiĉas, ĉu ne? Mi ne tre ĝuas ĉi tion”, mi diris. “Ni foriru.” La infanoj konsentis kaj ni foriris antaŭ la fino de la diservo.

Reveninte, ni komencis manĝi. Mi surpriziĝis trovi, ke la festo estis tiel normala, kiel festoj hejme. *Malsamaj ne abundas*, mi pensis. *La tuta familio babilas kune, la infanoj ĝenas ĉiujn per siaj ĵus ricevitaj, bruaj nenecesajoj, kaj ĉiuj aliaj drinkas. Estas vere Kristnasko.*

“Estas nur via taso kiu malpleniĝas”, Avo sciigis min, tirante min el miaj pensoj, “ne la boteloj.” Mi ridetis kaj lasis lin replenigi mian tason.



La nova jaro komenciĝis per stomakdoloro kaj lakso en apuda vilaĝo. Malbonaj aŭguroj. Aŭ bonaj, post ebrio. Mi penis festi la novjaron samkiel en Usono, drinkante ĝis noktomezo kaj tiam kunfrapante kuirilojn por bonvenigi la novan jaron kaj maltrankviligi la najbarojn. Sed je la naŭa horo mi jam estis sur la planko, plendanta, “la noktomezo estas neebbla. La nova jaro estas neebbla. La vivo estas neebbla. Veku min post kiam mi jam mortis.” Jen unua leciono de la nova jaro: biero, palmvino kaj ruĝa vino ne kune ludas bonkondute.

“Fermu la buŝon kaj levu vin!” diris mia pac-korpusa amikino, Amy. “Kiam vi

Pri la lingva situacio en Kameruno

Ene de la kamerunaj landlimoj, pli ol 280 lingvoj estas parolataj. Tiu diverseco estas fonto de kaj unueco (je nivelo de tribo) kaj diseco (je nivelo de lando).

Kameruno estas oficiale dulingva. Kiam la lando sendependiĝis, la kamerunanoj konservis la du lingvojn de la koloniistoj – la anglan kaj la francan – kaj nun ekzistas granda malamo inter la anglaparolantoj kaj la francparolantoj. Estas tre interese, kaj mi vidas ke Kameruno (samkiel la resto de la mondo) profitus multe de neŭtrala, komuna lingvo. —Joshua MORRIS



tiel maljuniĝis, ke vi ne kapblas resti veka ĝis noktomezo?”

“Kiam la ruĝa vino finiĝis...”

Mi dormetis ĝis noktomezo, kiam mi duone malfermis miajn okulojn kaj duonkore bondeziris al la planko “Feliĉan novjaron”, kaj reendormiĝis.

La sekvanta tago mi revenis al Ewoh. Mi kuiris grandan marmiton da rizo kaj fazeoloj kaj invitis ĉiujn veni por manĝi ĝin ĝis finiĝo. La rezulto estas impona: pli ol 40 homoj sidis kaj manĝis en mia eta salono. Mi ludadis muzikon per mia komputilo, sed baldaŭ la infanoj petis filmon. “*Sir!*” Ili nur vokas min tiel. “*Put da one wey big big crocodile di chop man for off toilet!*”, ili petis kreolangle. (“Ludu tiun, en kiu grandega krokodilo manĝas homon el necesejo.”) Tiel nomiĝas *Jurassic Park* en Ewoh.

Kiam la manĝaĵo finiĝis, mi ĉeestis tradician dancon. La dancantoj formis rondon kaj malrapide ĉirkaŭiris dum kvar aŭ kvin viroj ludis malgrandajn, altregistrajn flutojn kaj tri aŭ kvar homoj ludis tradiciajn basajn tamburojn el ligno. Unue, la muziko ŝajnis ne kiel muziko sed nur bruo, ĉar mi aŭskultis per okcidentaj oreloj. Post iom da tempo mi ekĝuis la sonon, kaj partoprenis en la danco. Mi renkontis la vilaĝoĉefon tie, kaj post kiam mi manfrapis por saluti lin, li salutis min: “Feliĉan novjaron, Morris!”

“Dankon, ĉefo. Same al vi.”

“Venu manĝi kun mi.”

Do mi iris en apartan ĉambron kun li kaj liaj “regfarantoj”, alte gravaj homoj de la vilaĝo. Pro miaj ĝenitaj internaĵoj mi ne sentis min manĝema. Tamen en Kameruno, se iu al vi donas manĝaĵon, estas malĝentile ne peni manĝi iom.

Virino donis al mi teleron plenan je

grizkoloraj aĵoj kun olea saŭco. “Kio estas ĉi tio?” mi demandis.

“Boligitaj nematuraj bananoj.”

“Ah, bongustaj. Kaj tio?”

“Bovkoro.”

“Bone.” Mi subtile brovumis. “Kaj, bonvolu, tio?”

“Bovintestoj.”

“Duoble bone.”

Mi manĝis buŝplenon da ĉio kaj poste provis rearanĝi la reston. Mi kaŝis la koron sub la intestoj kaj la intestojn sub la boligitaj bananoj. Regfaranto observis tion kaj diris, “La manĝado ne devas esti puno. Vi ne devas manĝi se vi ne volas.” Mi dankis lin per mia tuta restanta bov-koro.

Mi reiris hejmen nelonge post la manĝo. Mi pasigis la tempon en necesejo, pripensante ĉu serĉi malsamojn vere helpas aŭ ne. Iu diris: “Komparo estas ŝtelisto de ĝuo.” Mi elrigardis tra la fenestro kiu videbligas la domon kaj vivon de miaj najbaroj – aŭ por ili, la fenestro kiu videbligas la nevestitan blankulon.

La infanoj vidis min. “Sinjoro! Feliĉan novjaron!”

Mi ridis sur la pispoto. “Same al vi, amikoj.” ★

Ricevu UE-on elektronike!

La PDF-versio de *Usona Esperantisto* estas senpage havebla por ĉiuj membroj. Se vi ankoraŭ ne ricevas ĝin, nepre sendu vian retpoŝtadreson al la Centra Oficejo, ĉe:



eusa@esperanto-usa.org

enigmoj

Kiel kutime, inter solvintoj de la krucvortenigmo ni lotumos \$10-rabaton de la libros-ervo. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 31-a de Majo**. (Kontaktadreso troviĝas en pĝ. 1.) Bonŝancon!

Horizontale

1 Bird' kiu blekas`
"kokeriko!"

4 Kiel Julieta
sentis sin pri
Romeo,
ekzemple

9 "Rajdi ___ ĉevalo
oni ne lernas
sen falo."

12 Gen' de pinglo-
arboj foje uzataj
kiel ornamaĵoj

13 Kondukil' por
akvo aŭ informo

14 En "dudek unu",
ĝi valoras aŭ
unu aŭ dek unu
poentojn

15 Unua parto de
proverbo pri
mistrafo

18 Literinspekto
apud #6 sur
usonaj telefonoj

19 "Ne laŭdu la t___
antaŭ vespero."

20 La plej granda
kalifornia kun-
veno de E-istoj

22 Daŭre faris ion

26 Dimensio
vertikala

27 Farita el metalo,
kiun altiras
magnetoj

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11
12				13						14		
15				16						17		
			18				19					
20	21						22			23	24	25
26						27	28			29		
30					31					32		
33					34					35		
36				37						38		
				39			40		41			
42	43	44					45				46	47
48					49					50		
51					52					53		

29 Hispandevena
ekkrio, aŭdata
ekzemple ĉe
taŭroluktoj

30 Plendi pro
malfeliĉo

31 Dua parto de la
proverbo

32 Senharigita fel'
uzita en ŝuoj kaj
rimenoj

33 "Sen laboro ne
venas ___."

34 Riverfiŝ' rilata al
salmo

35 Malŝate ridindigi

36 Tian kongreson
okazos ĉi-jare en
Dalaso

38 Inteligenta
arbarobesto kiu
frandas mielon

39 Agas kaŭzi

41 Tempokvanto
pasinta ekde
naskiĝo

42 Tria parto de la
proverbo

48 Oni akuzis ŝin pri
Beatles-disigo

49 Surskrib' sur
koverto

50 Lirika poemo

51 Nerva kuntir'
de muskoloj

52 Modere


53 Kiam ripetita, la
n-ro 47 vertikala
kiun faras
kontenta kat'

Vertikale

1 Vigliga trinkaĵ'

2 Sufikso multiplika

- 3 “ _____ disponas, mizeron ne konas.”
- 4 Stango ĉirkaŭ kiu turniĝas peco de maŝino
- 5 Fizika grand’ kiun (hipoteze) donas la bosono de Higgs
- 6 Kaŭzanta malplezuron pro senintereso
- 7 Brita ĉefministro THATCHER
- 8 El du alternativoj, oni elektas la plian, ĝenerale
- 9 Ŝaŭma purigil’
- 10 Org. kiu subtenas la bonfarton de usonaj soldatoj, ekz. per distrado
- 11 Akvoflu’ malpli granda ol rivereto
- 12 Skribfluaĵo
- 13 Malvira
- 14 Etenditaĵ’ de substanco aŭ materialo
- 15 Edukita, kulturita
- 23 “Pasinta _____ el memoro.”
- 24 Plant’ kun brilruĝaj beroj, uzata kiel kristnaska ornamajo
- 25 “_____ ordonos, eĉ ŝton’ lakton donos.”
- 27 Hispana tradukisto DE DIEGO
- 28 TTT-a finaĵo
- 31 Restadas senflue
- 35 Bovbleke brua
- 37 Superpotenculo
- 40 Hom’ kiel Nikola TESLA aŭ Novak DJOKOVIC
- 41 Pugo, en Perth
- 42 Ĝisgenua ŝu’
- 43 Sovet_____o
- 44 Subita trafik’ de la nervsistemo
- 45 “Laŭdu la maron, sed restu sur _____o.”
- 46 Kreaĵo de BEAUFONT kaj COUTURAT en 1907
- 47 (Vidu n-ro 53 horizontalan)



Solvo de n-ro 2011:6

Gratulon al nia gajninto, **Terry HACK!** Kaj ankaŭ al Russ WILLIAMS, Arnold VICTOR, Vilĉjo HARMON, Briĉjo, Jessica GRASSO, Arlyn KERR, Anna BENNETT, Daĉjo RUTAN, Walter MURAWSKI, Peter MCCORQUODALE, William PECKENPAUGH, Olga DU TEMPLE, Keneĉjo GOLDBERGO, Cornelius J. MCKOWN, Ray REDD, kaj Ellen EDDY. P.S. – la kargotrajno estas **520m longa** kaj veturas je **15m/s**. Por pli detala solvo, kontaktu al la C.O.!

<http://esperanto-usa.org>

New in the E-USA bookstore



SUSPEKTINDA PERSONO

Branislav Nušić

Amuza teatraĵo en simpla Esperanto. Mola bindaĵo. 56 p. 1956. Serbujo. **\$3.70**



PASPORTA SERVO 2011

TEJO

Lastatempa eldono de la katalogo de gastigantoj en la reto por tutgloba vojaĝado. Enhavas 1087 adresojn en 90 landoj.

Mola bindaĵo. 188 p. 2011. Nederlando.

\$14.70

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online at

<<http://esperanto-usa.org/retbutiko>>.

More complete descriptions can be found online. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Due to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Adiaŭ... antaŭen!

Lastatempe mi faris la malfacilan decidon meti la finan punkton al la rubriko *Efike, gramatike*. Estis por mi granda plezuro verki tiujn ĉi artikolojn, sed nun mi deziras turni mian atenton al aliaj projektoj. Mi elkore dankas al ĉiuj miaj legantoj kaj esperas, ke vi iam ĉerpis ian utilon el la informoj kiujn mi prezentis ĉi tie.

Restas kompreneble multo por diri pri Esperanto-lernado, kaj tre plaĉus al mi lasi kun vi kelkajn lastajn pensojn pri tiu temo. Jen do miaj konsiloj por ĉiu, kiu volas plibonigi sian regon de Esperanto:

- *Legu, legu, legu.* Laŭ miaj propraj spertoj, ofta legado en Esperanto estas unu el la plej bonaj manieroj progresi. Se vi laŭtlegas, vi eĉ ekzercas viajn parolkapablojn. (Averto: viaj kunloĝantoj eble ekpensos, ke vi estas iom stranga.)
- *Lernu novajn vortojn.* Eĉ en la denaska lingvo oni lernas novajn vortojn dum la tuta vivo, do des pli ni devus daŭre lerni novajn vortojn en Esperanto. Kiam vi renkontas nekonatan vorton, notu ĝin kaj poste trovu la difinon. Se vi volas rapidigi vian progreson, klopodu lerni iun nombron da vortoj ĉiutage. Eĉ se vi lernos nur unu vorton ĉiutage, post jaro vi regos la lingvon rimarkeble pli bone.
- *Starigu demandojn al spertuloj.* Esperanto estas relative facila lingvo, sed ĝi ja estas lingvo, do iafoje la lernado de Esperanto povas esti iom malfacila. Kiam vi alfrontas malfacilaĵojn, indas konsiliĝi de iu



Steven CYBULSKI

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

stcybulski@gmail.com

kiu jam venkis tiujn malfacilaĵojn. Ĉu en via loka klubo, ĉu ĉe *Lernu!*, ĉu kadre de NASK aŭ alia Esperanto-kurso, eblas trovi esperantistojn kiuj helpos vin se vi nur petos helpon.

- *Uzu kaj ĝuu la lingvon.* Plibonigo de viaj kapabloj en Esperanto postulos laboron, kaj tre malfacilas labori super io kion vi ne ĝuas. Trovu manierojn uzi Esperanton kiuj plaĉas al vi.

Mi deziras al ĉiu el vi tre sukcesan el-lernadon de nia lingvo. Dankon denove, kaj adiaŭ! ★

Senintenca esperantajo?



Ĉu la nomo name de ĉi tiu magneta ludo game ne estas iom redonda redundant?
(Foto danke al Simono KEITH)